# TEJO-aktuale: numero 322, 2012-07

### [Esperanto] Unua Vintra Aranĝo de BEJO, Macaé, Brazilio, 26a ĝis 30a de julio

Ĉu neniom por fari julie? Ĉu Hanojo tro foras al vi? Ĉu vi sopiras julian mojosan esperantumadon? Ne ploru! Partoprenu en la unua VINA!

Ĝi okazos de la 26-a ĝis la 30-a de julio en la urbo Macaé, subŝtato Rio de Ĵanejro. Tamen, en la tagoj 28 kaj 29 ni vizitos la regionon Sana, montara distrikto de Macaé. Tie eĉ dum vintro iomete varmas! Kunportu viajn banvestojn por baniĝi en akvofalo kaj maro, kaj ankaŭ viajn muzikilojn por muzikumi vespere en la aranĝejo. Kaj ne forgesu la akuzativon nek la bieron! Legu pli: https://www.facebook.com/events/369595093108834/

### Somera renkontiĝo en Stokholmo, Svedio, 21a de julio

Bonvenon al esperanta renkontigho kun literatura temo, en verda loko borde de Stokholmo! Dum la renkontigho okazos interalie malfrua jarkunveno de SEJU. La loko estas parceleto (kolonilott) en Bergshamra, atingebla per subfervojo de centra Stokholmo.
Malferma programo:
- Jarkunveno
- Literatura metiejo
- Prelego
- Tradukado
- Amikumado

Legu pli: https://www.facebook.com/events/383983888331296/

### [Esperanto] “signoj de viv'” de Initaloj D.C. aperos je 01 Aŭgusto.

Vi jam povas aŭskulti 2 pecojn kaj antaŭmendi la albumon! Aŭskultu: http://initialsdc.bandcamp.com/album/signoj-de-viv

### Flo (Vinilkosmo) ricevos kulturpremion de FAME-fondaĵo

Laŭ retejo de la urbo Aalen: http://www.pressemeldung-baden-wuerttemberg.de/aalen-aalener-esperanto-kulturpreis-2012-fur-floreal-martorell-4841/ (germanlingve)

Pri FAME-fondaĵo: http://eo.wikipedia.org/wiki/FAME-fonda%C4%B5o

### [baveleto] kunveturado al franca kastelo Greziljono en julio - aŭgusto

Pluraj e-istoj loĝantaj en aŭ apud Freiburg i.B kaj Rottweil veturos al kastelo Greziljono inter la 21a de julio kaj 20-an de aŭgusto. Se vi volas uzi la eblecon kune veturi en iuj tagoj, bv. skribi al Bert kaj kopie al la kastelo

Konsultu la programon de kursoj kaj aktivaĵoj en: http://gresillon.org/somero.

Maison Culturelle de l'Espéranto

château de Grésillon

45159 St. Martin d'Arce

FRANCE
http://gresillon.org

### Esperanto Ilustrita - La Virtuala Revuo de Esperantujo aperis

Legu la aktualan eldonon: Portugallingve: http://esperantoilustrado.blogspot.com.br

Esperante: http://esperantoilustrita.blogspot.com.br

